

STARTO

N-ro 1/2009 (230)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**La 29-an kaj 30-an de marto 1969 en Brno
estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio.**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšínkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

Komisiono de ĈEA: pedagogia

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

Kasistino: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz, 774 928 974 (membrobazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino: Lucie Karešová, Havlíčkovonám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

Kontrolgrupo de ĈEA:

Prezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorferdomo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, Gerrit Berveling, Pavel Polnický

40 jaroj de ĈEA



Sabate la 29-an de marto 1969 en la salono de Besední dům en Brno estis inaŭgurita la fonda kongreso de ĈEA. La ĉeestantaron alparolis prezidanto de Loka Kongresa Komitato kaj estro de la Esperanto-Klubo en Brno s-ano Josef Vondroušek. Salutparolojn prezentis oficialaj gastoj, inter ili la reprezentanto de Ĉeĥa Ministerio de Kulturo, direktoro de Kleriga Instituto en Prago, d-ro Miroslav Bukovský, la sekciestro de la Urba Nacia Komitato en Brno Václav Pazourek kaj la direktoro de la Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno Vladimír Stein. Leteron de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio prof. Ivo Lapenna laŭtlegis oficiala reprezentanto de UEA s-ano Mikuláš Nevan. La Kongreso aparte kore bonvenigis la vortojn de Pavol Rosa, reprezentanto el Slovakio, kiu parolis en la nomo de la Kleriga Instituto en Bratislava, la Preparkomitato de la Asocio de Esperantistoj en Slovakio (AES) kaj la Slovaka Esperantista Societo ĉe la Slovaka Akademio de Sciencoj. Li anoncis i.a.,

ke fonda kongreso de AES okazos la 9-11an de majo en Liptovský Hrádok (Meza Slovakio).

La partoprenantoj aŭskultis paroladojn de s-ano Inĝ. František Sviták, prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, kaj s-ano Josef Vitek, proponita prezidanto de ĈEA.

La kongreso aprobis la Statuton de ĈEA kaj elektis Centran Komitaton de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La baloton partoprenis 162 delegitoj el 101 rondetoj. La kongresa prezidio sendis telegramojn al la prezidento de la respubliko kaj al la ĉeĥoslovaka hokea teamo en Stockholm, transdonis dankleteron al la direktoro de la Kleriga Instituto D-ro Miroslav Bukovský kaj sendis salutleterojn al la Ĉeĥa Nacia Fronto kaj la Ĉeĥa Ministerio de Kulturo. La traktadon dum la unua tago gvidis la prezidanto de PK ĈEA s-ano Jaroslav Mařík.

Dimanĉe kunsidis kelkaj sekcioj, jam fonditaj ĉe ĈSEK kaj aliaj, kiuj konstituigis dum la kongreso. En la plenkunsido prezentiĝis la Komitato de ĈEA kun sia prezidanto Josef Vitek.

Oficiala organo de la nova organizaĵo fariĝis la ĝisnuna informilo de PK ĈEA "Starto".

La kongreso atribuis al dek meritplenaj esperantistoj-pioniroj la titolon "honora membro de ĈEA". Nome:

Anna Bárochová, Dr. Josef Fousek, Theodor Kilian, Jiří Kořínek, Miloš Lukáš, Dr. Tomáš Pumpr, František Pytloun, Vilibald Scheiber, Julie Šupichová kaj Jaroslav Šustr.

En la ferma parto de la kongreso estis tralegita kaj per unuanima voĉdonado akceptita Program-deklaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. *(laŭ Starto 1969)*

PROGRAM-DEKLARO DE ĈEA 1969

(aŭtenta teksto el Starto 1969)

En sia programo, aprobita de la konstitua kongreso, ĈEA konsideras kiel sian ĉefan taskon la disvastigadon de la IL kiel rimedo de interkompreniĝo kaj internacia kunlaboro. La asocio klopodos plilarĝigi siajn kontaktojn kun eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj kaj institucioj, tiu ĉi kunlaboro devas okazi surbaze de la respektado de homa, nacia kaj politika suvereneco.

ĈEA celas plenumi ĉi tiujn principajn aktivecojn:

- konatigi internacian lingvon al la plej vasta publiko kaj zorgi pri instruado de IL
- subteni lokajn Esperanto-grupojn kaj ilian agadon
- eldonadi regulan presorganon - informilon kaj ligilon de sia membraro
- eluzi ĉiujn eblecojn por eldonado de Esperanta literaturo kunlabore kun lokaj Esperanto-organizaĵoj
- atingi kolektivan kaj individuan membrecon en superaj organoj de la universala Esperanto-movado
- zorgi speciale pri eduko de junularo, kiu montris ekstreman aktivecon en

lastaj jaroj

- helpi al plua aktiveco de fakaj sekcioj kaj komisionoj
- mobilizi teoriajn esplorojn pri internacilingva problemoj kaj la internacia lingvo mem
- kunlabori kun aliaj enlandaj sociaj organizaĵoj.


Tiamaj gvidorganoj de ĈEA

Estraro: Josef Vítek (prez.), František Sviták (vicprez.), Drahomír Kočvara (vicprez.), Pavel Polnický (sekr.).

Estraranoj: Jaroslav Mařík, Zdeněk Hršel, Jiří Pondělíček. *Komitatanoj:* Oskar Hrubý, Ing. Ladislav Krajíc, Vladimír Bořánek, Vlastimil Novobilský, Miloš Hruška, Linhart Rýznar, Naděžda Zedníčková, Pavel Sittauer, Vlastimil Kočvara, Drahomíra Zdvihalová. *Vickomitatanoj:* Josef Vondroušek, Tomáš Balda, Jaromír Jermář, František Wohlmuth, Oldřich Kníchal, Zdeněk Polák, Jarmila Rybáčková, Josef V. Otta.

Revizia komisiono: Josef Drlík, Milada Josková, Vladimír Mohapl.

Anstataŭantoj: Aleš Bednařík, Gustav Kremláček.



La 20-an de januaro 1969 Jaroslav Mařík subskribis ĉe la ministerio por internaj aferoj transprenon de aprobita Statuto de ĈEA

PROGRAM-DEKLARO de la Komitato de Junulara Sekcio

(aŭtenta teksto el Starto 1969)

Sub iom fiera titolo ni prezentas al vi tute simplan liston de tio, kion ni volas en la plej frua estonteco fari, aŭ kion ni volas almenaŭ provi. La Program-deklaro rilatas al la periodo ĝis la fino de la jaro 1969, kiam ni prezentos la rezultojn de nia agado al la membraro kaj igos ilin prijuĝi demandojn pri la estonteco de la esperantista junularo en nia lando. Tiutempe ni jam konos niajn eblecojn kaj kapablojn, la nombron de membroj kaj ilian volon kunlabori, kaj ni konkludos laŭ tio. Fine, la membraro ne kotizos al la Sekcio, sed kontribuos per siaj ideoj, proponoj kaj helpo. La celojn difinitajn en la Regularo de la Sekcio kaj en tiu ĉi program-deklaro ni povas plenumi nur per kunlaboro de ĉiuj membroj.

La Komitato de la Sekcio:

- strebos kune kun junaj esperantistoj en Slovakio krei ĉeĥoslovakian junularan esperantistan organizon
- ligos kontaktojn kaj kunlaboros kun junularaj esperantistaj organizoj, amikaj al nia patrujo
- petos pri aliĝo de la Sekcio al TEJO
- kunlaboros kun organizoj, defendantaj la homrajtojn kaj batalantaj kontraŭ la lingva diskriminacio, precipe kun Societo por la Homrajtoj
- kunlaboros kun junularaj organizoj, uzantaj Esperanton, ekz. kun Junák (Skolto)
- strebos varbi kiel eble plej grandan nombron de junaj esperantistoj por membriĝi en la Asocio kaj Sekcio

- sekurigos la produktadon kaj distribuadon de la asocia gazeto
- kunordigos preparlaborojn por eldoni lernolibrojn de Esperanto
- propagandos junularan etapon de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov
- informos la neesperantistan junularon pri la agado de la Sekcio kaj pri la Internacia Lingvo ĝenerale
- informos la membraron pri okazaĵoj en la monda Esperanto-movado kaj pri eblecoj partopreni Esperanto-agadojn eksterlande, parte per organo de la Sekcio "Junularaj Paĝoj", parte per neregulaj cirkuleroj aperantaj de tempo al tempo laŭnecese
- por interesiĝantaj membroj aranĝos lingvajn ekzamenojn
- per ĉiuj fortoj serĉos ĉambron por sia sekretariejo, sen kiu la agado de la Sekcio tute ne eblas.

Ni prezentas al vi tiujn ĉi punktojn kiel nian laborplanon, kiu kunlabore kun vi ne devus resti nur sur papero.



Ni adiaŭu la konstitucian kongreson per bildo de la kongresa estraro

Agado de ĈEA 1969-2009

Asociaj kongresoj. Dum la 40 pasintaj jaroj okazis 12 asociaj kongresoj (en kiuj estis nomumitaj 68 honoraj membroj) kaj la sama nombro de asociaj konferencoj (sen elekto de nova estraro).

Internaciaj aranĝoj. La plej grava internacia Esperanto-aranĝo en nia lando estis sendube UK 1996 en Prago, akompanata de la 30a Infana Kongreseto en Rabyně kaj la 62a IKBE-kongreso (nevidantoj) en Prago. Signifaj estis ankaŭ la 43a IFEF-kongreso en Olomouc 1991 kaj la 53a en Tábor 2000, 67a SAT-kongreso en Strážnice 1994 kaj la 72a en Karlovy Vary 1999, la 48a IKUE-kongreso en Olomouc 1995 kaj la 55a en Kroměříž 2002, la 50a KELI-kongreso en Janské Lázně 2000, OSIEK-konferencoj en Strážnice 2001 kaj Prago 2003, ILEI-konferencoj en Tábor 1996 kaj Karlovy Vary 1999. Samjare gastis en Opava la 12a Internacia Medicinista Esperanto-konferenco.

Enlandaj aranĝoj. Niaj kluboj preparis tiom da diversaj aranĝoj, ke ni ne povas eĉ ĉiujn mencii, do almenaŭ ni nomu kulturajn festivalojn en Opava kaj Ústí nad Labem, renkontiĝojn de Pacdefendantoj en Pardubice, Esperanto-tagojn en Pardubice kaj Svitavy, Esperanto-balojn en Česká Třebová, renkontiĝojn sur la montoj Čantoryje kaj Kunětická. Turismon reprezentas renkontoj en Šumperk, Plasy apud Plzeň, IBIRE

(bicikla turismo), internacian kluban kunlaboron ekz. BBB-renkontoj (Brno-Bratislava-Budapest) aŭ Ĉeĥaj-Saksaj Tagoj en Ústí nad Labem. Multaj kluboj festas siajn gravajn datrevenojn per koncertoj aŭ aliaj kulturaj programoj. La 25an datrevenon de ĈEA ni festis en Havířov 1994.

Klerigado. Somerajn kursojn preparis Esperanto-tendaroj en Lančov, Nekvasovy, Herbortice kaj Sebranice, printempajn kaj aŭtunajn pensiono Espero en Skokovy (AEH). Internaciaj Paroligaj Semajnoj (InPaSem) realiĝas en Dobřichovice. La asocio preparadis kursojn por junularaj estontaj funkciuloj en Valtice, konsultiĝojn kaj seminariojn por funkciuloj en Mělník. En la lastaj jaroj intereso pri Vikipedio sin trejnas en Písek dum Sabla Printempo. Plurajn seminariojn kaj asociajn ekzamenojn preparis iama pedagogia sekcio. Eble la plej grava kleriga aranĝo estis seminarioj pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko, kiujn dum la socialismo alterne organizadis la ĉeĥa kaj la slovaka scienc-teĥnika sekcio, ekde 1998 la agentejo KAVA-PECH en Dobřichovice.

Organizoj. Dum la socialismo ne povis ekzisti alia esperantista organizo ol ĈEA kun siaj kluboj kaj sekcioj, sed en 1991 memstariĝis la sekcio de handikapitaj esperantistoj kiel *Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj* (AEH)

kaj en 2005 ankaŭ *Ĉeĥa Esperanto–Junularo* (ĈEJ). En 2003 estiĝis *Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno* kaj en 2008 societo *E–lingvo*, ankaŭ en Brno, kiu sin konsideras neesperantista, sed proponanta Esperanton kiel eŭropan lingvon pro ekonomiaj motivoj. Privata firmao KAVA-PECH en Dobříchovice apartenas al la plej gravaj Esperanto-eldonejoj en la mondo, plie ĝi organizas esperantistajn seminariojn, renkontiĝojn, karavanojn al UK k.s.

Periodaĵoj. Nun vi ricevas la 230-an numeron de *Starto*. Dum la socialismo aperis ankaŭ literaturaj aldonoj de *Starto*, t.n. *Panoramoj*, dediĉitaj al gravaj literaturaj personoj (Lukáš, Hromada, Kníchal, Vondroušek, Kořínek, Urbanová, Vinař). Nemultaj, sed gravaj estis la ĉeĥoslovakaj numeroj de la internacia revuo *Paco*, propagandantaj precipe nian kulturon. Plurajn literaturajn kajerojn preparis J. Rumler kaj J. Karen (*Kvarfolio*, *Poeto ne mortas*, *52 poetoj*, *Abunde kaj Redunde*, *Karel Čapek*, *Jiří Kořínek*). Kluboj eldonadis siajn bultenojn kaj informilojn, el kiuj estis fama *Informilo de Vsetín* (Berka), *SET-ano* de Třebíč kaj *Verda Familio* el Mnichovo Hradiště. Nun aperas regule *Informilo de AEH*, *Bulteno de EK Praha* kun literatura enhavo kaj *Dio Benu* de la ĉeĥa IKUE-sekcio. Nialande estas redaktata ankaŭ *Dia Regno* de KELI. Antaŭ jaroj aperadis ĉe ni ankaŭ *Esperanta Ŝako*.

Por la faka lingvo tre gravas, ke post

ĉiu AEST-seminario aperis kajero kun ĉiuj prelegoj. Simile ankaŭ post la Praga OSIEK-konferenco kun beletra enhavo. Nia IFEF-sekcio redaktas Fervojfakajn kajerojn. Por la iama medicina sekcio d-ro Josef Hradil redaktis Medicinajn informojn, poste sub la nomo Sano. D-ro Josef Kavka estis multjara redaktoro de grava faka periodaĵo *Scienca Revuo kaj de Geologio Internacia*.

Lerniloj. Dum la socialismo la Ŝtata Pedagogia Eldonejo eldonis por ni plurfoje ambaŭdirektan poŝvortaron de Rudolf Hromada, lernolibron por komencantoj de Theodor Kilian kaj por progresintoj de Josef Cink. En 1989 aperis nova lernolibro por aŭtodidaktoj de Věra Barandovská. Plurajn lernilojn eldonis EK Třebíč por sia tendaro en Lančov (*ABC de Esperanto*, *la 808 plej multe uzataj vortoj*, *La Mondo Rakontas*, *Biografioj kaj historio*, *Gramatiko de Esperanto*). La asocio mem eldonis la korespondan kurson de Josef Cink kaj *Esperanto por infanoj* de Ladislav Prachař, fine de la 1980-aj jaroj proprakoste ĝi reldonis la vortarojn de R. Hromada kaj de fratoj Filip. En 1970 ĈEA kunlabore kun Heroldo de Esperanto eldonis la internacian lernolibron de William Auld *Paŝoj al plena posedo*.

Post 1990 la novajn vortarojn preparitajn de la triopo Zdeněk Hršel, Miroslav Malovec kaj Karel Kraft (sub fina redakto de la lasta) aperigis KAVA-PECH. Ĉe la sama eldonejo

aperis ankaŭ lernolibro por trimonata studado verkita de Petr kaj Stanjo Chrdle kaj lernolibroj por infanoj de Jana Melichárková.

Kvar kajerojn de legolibro por komencantoj eldonis EK en Mladá Boleslav kaj Mnichovo Hradiště.


Beletro. El la ĉeĥa literaturo aperis jenaj verkoj: *Libro de apokrifoj* (K. Čapek, 1970), *Sileziaj kantoj* (P. Bezruč, 1970), *La perdita vizaĝo* (J. Nesvadba, 1973), *Riporto skribita en la pendumila maŝo* (J. Fučík, 1979), *Rakontoj el unu poŝo - Rakontoj el la dua poŝo* (K. Čapek, 1981), *Konstruado en alto* (O. Březina, 1982), *Ondro kaj drako* (V. Dyk, 1985), *Lumo en tenebroj* (F. Kožík, 1992), *Ne nur soldato Ŝvejk* (J. Hašek, 1994), *Milito kontraŭ Salamandroj* (K. Čapek, 1994), *Propra biografio* (Karolo IV, 1995), *La blanka malsano* (1996), *Peza vino* (1996), *La knaboj de la Kastora Rivero* (1996), *Aŭdienco* (1996), *Majo* (K. H. Mácha-T. Pumpr, 1997), *Ekaŭdi la animon* (V. Ludíková, 1998), *Majo* (K. H. Mácha-J. Rumler, 1999), *Mondo afabla ne nur al vortoj* (J. Karen, 2002), *La vortoj de la nokto* (Z. Bergrová, 2002), *Rakontoj ne nur ŝercaj* (V. Váňa, 2002), *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito* (J. Hašek, 2004), *Taglibro de mia frato* (P. Ginz, 2005).

Fakaj kaj popularigaj verkoj: *Jan Amos Komenský, pioniro de internacia lingvo* (W. Hube, 1970), *Poŝatlaso de la mondo* (1971), *Pri la*

varmo (M. Tůma, 1972), *Komenio kaj la internacia lingvo* (Kníchal-Novobilský, 1974), *Tridek jaroj. Faktoj pri Ĉeĥoslovakio* (1976), *Světadíl bez tlumočníků* (O. Kníchal, 1978), *Esperanta medicina terminaro* (J. Hradil, 1979), *Heraldiko. Veksilologio* (J. Klement, 1979), *Meze de Eŭropo* (1980), *Burgoj kaj kasteloj* (I. Papírníková, 1980), *Komputika vortaro* (F. Cabák, 1982), *Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj* (J. Rybář, 1982), *Historio de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio* (S. Kamarýt, 1983), *Ĉiam malnova kaj ĉiam nova* (G. Bradatsch, 1985), *Jura vortaro* (K. Traxler, 1986), *Terminologia kurso* (J. Werner, 1986), *Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana* (J. Werner, 1990), *Propedeŭtika valoro de la internacia lingvo* (H. Frank, 1992), *Lingvo kaj kibernetiko* (J. Maxwell, 1994), *Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion* (H. Frank, 1994), *La latina kiel interlingvo* (V. Barandovská, 1995), *Profesia uzo de Esperanto* (P. Chrdle, 1995), *Ĉu leŭcito en Bohemio?* (J. Kavka, 1995), *La nova realismo* (B. Vogelmann, 1998), *Terminaro de feloj* (L. Středa, 1998), *Kompendio de psikanalizo* (S. Freud, 2003), *Kompleksia medicino kaj saama akupunkturo* (Puramo Chong, 2003), *Matematika vortaro* (M. Bavant, 2003), *Terminologiaj konsideroj* (J. Werner, 2004), *Heroo de amo* (K. Kraft, 2005).

-mm-

Alvoko por infanaj konkursaĵoj pri fervojo



Ĉeĥa Esperanto-Asocio starigas konkurson de infanaj artaĵoj kun la temo **FERVOJO**, kies celo estas omaĝi la centjariĝon de la organizita Esperanto-movado inter fervojistoj, en kiu ankaŭ ĉeĥaj esperantistoj ludis gravan rolon.

La kondiĉoj por la konkursaĵoj:

Partopreni rajtas ĉiuj infanoj ĝis 15 jaroj inkluzive (laŭ la atingita aĝo en 2009), kiuj parolas aŭ lernas Esperanton.

Estas du aĝkategorioj, kategorio A ĝis 10 jaroj inkluzive, kaj kategorio B ekde 11 ĝis 15 jaroj. Oni akceptas ajnan artaĵon surpaperan (aŭ sur alimateriala folio) en la grandeco maksimume A4 (210 x 297 mm). Povas esti desegnaĵoj, poemoj, rakontoj, fotografaĵoj aŭ ajnaj kombinaĵoj de ili. Ĉiu aŭtoro povas sendi maksimume 3 konkursaĵojn.

La aliĝiloj kun detala regularo estas troveblaj ĉe www.esperanto.cz/infan konkurso, sed oni povas ilin ankaŭ peti ĉe Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, CZ-26802 Svitavy, rete dvor.libuse@seznam.cz.

Estos konsiderataj nur la artaĵoj, kiuj estas akompanataj de la aliĝilo, respegulas la regularon de la konkurso kaj atingas ĝis la 31-a de aŭgusto 2009 la adreson: Esperanto-muzeo, Blanka Ĉuhelová, Máchova alej 1, CZ-56802 Svitavy.

Elektitaj konkursaĵoj estos ekspoziciataj en Esperanto-muzeo Svitavy ekde aŭtuno 2009 dum 6 monatoj en la planata ekspozicio pri centjariĝo de internacia Esperanto-movado inter fervojistoj. Kazze de intereso la ekspozicio estos prunte donita ankaŭ al aliaj urboj, eĉ eksterlanden.

Minimume tri aprezitaj aŭtoroj ricevos premion kaj estos invitetaj al la inaŭguro de la ekspozicio.

Petro Chrdle

Inaŭguro de ekspozicio

Esperanto kaj junularo

okaze de la 40-jariĝo de ĈEA

kaj

la 65-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO,

unufoje en Ĉeĥio

sabate la 28-an de marto 2009



je la 14-a horo

en Esperanto-Muzeo, Svitavy

La ekspozicio priskribos la agadon de ĉeĥaj esperantistoj inter la jaroj 1969-2009. Ĉar ĉi-jare okazos en Liberec la 65-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (18/25-07-2009), parto de la ekspozicio estos dediĉita al agado de ĈEA inter junularo. La ekspozicio daŭros ĝis fino de septembro, kiam ĝin anstataŭos ekspozicio pri esperantistaj fervojistoj kun infandeseĝoj.

Cent jaroj de Esperanto en Prostějov



La 30-an de januaro 2009 estis inaŭgurita ekspozicio en la vestiblo de la kinejo Metro - sur paneloj estas fotoj el diversaj Esperanto-aranĝoj kaj fotoj de historiaj fondaj dokumentoj.

La 7-an de februaro 2008 kolektiĝis sesdeko da partoprenantoj antaŭ la monumento de T. G. Masaryk, por festi la centjariĝon de la klubo. Unue ĉiuj foriris al la lernejo, kie antaŭ cent jaroj la klubo estis fondita. Post mallonga parolado de J. Liška la ĈEA-prezidantino Jana Melichárková senvualigis memortabulon dediĉitan al tiu historia evento.



La tuta grupo poste vizitis memorŝtonon pri Esperanto (starigitan en 1999 okaze de la kluba 90-jariĝo) en alia urboparto kaj post tagmanĝo la urbodomon, kie estis prezentita al ili la ceremonia salono. De tie ĉiuj foriris al la klubejo



por vidi la renkontejon de lokaj esperantistoj kaj ilian kluban kronikon. Kompreneble ne mankis ankaŭ tragardo de la ekspozicio en la kinejo Metro.



La programo kulminis per dancamuzo en junulara dancklubo. Al la riĉega tombolo kontribuis kiel sponsoroj ĉirkaŭ trideko da lokaj firmaoj, kies nomoj estis laŭtlegitaj. Marcipanan gratulon alportis geedzoj Vyšinka el Vracov.



En la klubejo - sur la muro prezidantoj de la klubo



Ekspozicio en la kineja vestiblo



En la klubejo troviĝas libroŝranko kaj murgazeto



Komuna tagmanĝo



Ĉe la Esperanto-ŝtono



En la urbodomo de Prostějov



Dancamuza vespero



Tombolo sprite gvidata de Kvido Janik



ĈEA kaj E-klubo „La Ponto“,
kunlabore kun ĈEJ kaj E@I
invitas vin al la

IV-a Sabla Printempo

3.-5.4.2009 en Písek

La aranĝo estos ĉi-jare dediĉita precipe al du temoj:

1. **Trejnado rilate al preparo de jubilea DVD** omaĝe al 40-jariĝo de ĈEA. Precipe tiuj el vi, kiuj ŝatus kontribui kaj volas lerni kiel, venu! Viajn sciojn vi sendube povos utiligi ankaŭ en neesperantaj aktivecoj.

2. Krome dum la aranĝo estos fondita traduksekcio (aŭ tradukgrupo) de ĈEA, kiu ĉi-foje okupiĝos precipe pri problemaro de tradukado de turismaj materialoj (ĉiĉeronaj tekstoj, retpaĝaroj ktp).

Dum la tuta sabato vi povos intense trejniĝi en unu el la kvar elektitaj grupoj:

1. skanado kaj ciferecigo de tekstaj E-dokumentoj kaj prilaboro de fotoĵoj
2. registrado, prilaboro kaj ciferecigo de sondosieroj
3. prilaboro de videofilmoj (inkluzive subtekstojn)
4. tradukado de turismaj tekstoj en

Esperanton.

Por komunaj vesperoj estas preparataj aktualaj prezentoj pri „Esperanto kaj Interreto“, projekciado, en liberaj momentoj estos ebleco viziti la urbon. Dimanĉa antaŭtagmezo estos dediĉita al komunaj prezentoj de la laborgrupoj kaj al pritrakto de kunordigo de sekva kunlaboro.

Tranoktado estas certigita en dultitaj ĉambroj en la studenthejmo, situanta proksime al la urbocentro. Duŝejo/necesejo komunas ĉiam por 2 ĉambroj, kontraŭ krompago (160,-Kč/2 noktoj) disponeblas kelkaj unulitaj ĉambroj. Por membroj de ĈEA kaj ĈEJ validas avantaĝa kotizo 590,- Kč (subvenciota de la urbo Písek el la eŭropaj fondusoj, kaze de nericevo garantiata de ĈEA), kiu inkluzivas 2 tranoktojn, 2 kompletajn restoraciajn manĝojn sabate kaj kompletan instruprogramon kun instru-materialoj. Kotizo por nemembroj estas 890,-Kč.

Pli detalajn informojn kaj aliĝilon petu ĉe: esperanto.pisek@seznam.cz
aŭ ĉe: PhDr. Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek.

La kapacito estas limigita, tial bv. ne prokrasti vian aliĝon!

Ni ĝojatendas vian aktivan partoprenon!

-pd-



Instruado pri Vikipedio realiĝis la 26-an de januaro 2008 en Pardubice por grupo de 11 esperantistoj el Pardubice, Lanškroun kaj Česká Třebová.

Novaj honoraj membroj

nomumitaj dum la asocia kongreso en Pĕrerov oktobre 2008.

Jana Cíhová-Hrdličková

(1923), profesie iama fremdulgvdistino, estas internacie konata kiel esperantista poetino kaj tradukantino. Ŝiaj tradukoj de belestro kaj de klerigaj tekstoj aperadis en la revuoj Paco, La Suda Stelo, Norda Prismo. Ŝiaj unuaj poemoj estis *La infano de Lidice* kaj *Ĉiam Lidice*, la ceteraj aperis en la kolektoj *Liriko intima* (1988), *Kvar sezonoj* (1990), *Pragaj preĝoj* (1991) kaj *Signo de ekkrio* (1991).



Petr Chrdle (1946) estas posedanto de la agentejo KAVA-PECH, komitatano de UEA, iama prezidanto kaj nuntempa vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, rajtigita ek-

zamenanto de ILEI kaj verkinto de *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj* kaj de la lernolibro *Esperantem za tři měsíce* (kune kun sia edzino Stanislava Chrdlová). Li organizas seminariojn kaj kolokvojn (InPaSem, KAEST), karavanojn al UK kaj aliajn aranĝojn. Lia agentejo apartenas al la plej gravaj esperantlingvaj eldonejoj en la mondo, kie aperas gravaj verkoj (*Biblio, Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaroj, Nova realismo, Brava soldato Ŝvejk, Taglibro de mia frato, Heroo de amo, La skandalo pro Jozefo, Rapide pasis la temp'*,

Matematika vortaro, Terminologio de feloj k.a.). De li eldonita *Arne, la ĉefido* fariĝis "Infanlibro de la jaro 2006". Krome li produktas ankaŭ librojn por aliaj eldonejoj, (inter aliaj *La Nova PIV*, kaj *PIV 2005* por SAT).

Ludmila Klegová

(1926) estis aktiva esperantistino jam de sia junaĝo kiel membrino de Junularo Ostrava. Ekde la fondo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (1969) ŝi sindone laboris por renoviĝo de la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ŝi ankaŭ certan tempon laboris en la sekretariejo en Prago. Multajn jarojn ŝi prezidis EK en Poruba kaj fondis Esperanto-rondeton de pensiuloj. Kun aliaj klubanoj ŝi iniciatis plantadon de Esperanto-arbo (tilio) helpe de studentoj de Gimnazio Olga Havlová en Poruba. Ŝi havas grandan meriton pri eldono de informa Esperanto-broŝuro de la urbo Ostrava, kiun ŝi ankaŭ tradukis. Bedaŭrinde tio estis ŝia lasta poresperanta laboro, kiun ŝi rezignis pro ne tre bona sanstato. La klubanoj elektis ŝin Honora Prezidantino de EK Ostrava Poruba.



Josef Xaver Kobza

(1921) estas ĉeĥa pastro kaj esperantisto, konata kiel kunorganizinto de la Katolikaj Esperanto-Tendaroj okazintaj en la jaroj 1969 – 1977 en lia naskiĝvilaĝo Herbortice. En la jaro 1950 li soldatservis en PTP (armea reeduka laborbataliono), dum kiu servo li estis kondamnita al dujara prizono pro ne-

permesita grupiĝado. Post sia reveno el malliberejo al Herbortice kaj laborante denove kiel pastro, li fondis E-rondeton por lerni la internacian lingvon. Baldaŭ poste li partoprenadis diversajn Esperanto-aranĝojn enlande kaj en Pollando. Li partoprenis UK-ojn en Sofio kaj Budapeŝto. Li fervore aktivadis en la katolikaj someraj tendaroj, en multaj renkontiĝoj de la esperantistoj, precipe en IKUE-kongresoj. En la urbo Písek, kie li dum multaj jaroj plenumis sacerdotan servon, li kunorganizis sukcesajn E-aranĝojn. Nuntempe li loĝas en porpastra domo en České Budějovice, plu restante en aktiva kontakto kun la Katolika sekcio de ĈEA.



Pavel Polnický (1943) estas sekretario de KELI, prezidanto de la ĉeĥa KELI-sekcio kaj sekretario de ĈEA. Li esperantistiĝis en 1964 kaj laboris ekde 1969 profesie kiel sekretario de ĈEA. En 1974 li perdis tiun ĉi laborpostenon pro sia rifuzo eniri la komunistan partion.

Li estas ĉeforganizanto de la Kongresoj de KELI en Janské Lázně (2000), en Bystřice pod Hostýnem (2004), en Strážné (2006) kaj en Pribylina (2008). Krome li kunorganizis multajn aliajn aranĝojn (ekz. kongresojn de IFEF kaj SAT en Ĉeĥio) kaj estis kasisto de la LKK de la Universala Kongreso 1996 en Prago. Ekde 2005 li zorgas ankaŭ pri la presado kaj ekspedado de la gazeto Dia Regno de KELI.

Jindřich Tomíšek

(1939) estas membro de EK Přerov. Esperantisto ekde la jaro 1952, de la jaro 1969 membro de ĈEA kaj fervojista sekcio. De la jaro 1970 membro de IKUE kaj de la jaro 1982 komitatano de IFEF. Li ofte publicas en diversaj medioj Esperante kaj ankaŭ ĉeĥe. Li kunlaboras kun radio-redakcioj de Esperanto-elsendoj (Varsovio, Vatikano, Pekino). En la jaro 1980 li estis premiita de Fundación Esperanto por originala eseo “Nia popolo kaj popola kanto” Li ricevis ankaŭ premion de la redakcio de Ĉina Radio Internacia. Li prelegas dum kongresoj de IFEF pri fakaj temoj. Li multe vojaĝas eksterlanden, kaj pri siaj travivaĵoj kaj impresoj prelegas en la loka klubo. Estas interese mencii, ke li apartenas al sukcesaj pliaĝaj maratono-kurantoj.



Nur du el la novaj honoraj membroj povis ĉeesti la solenan transdonon de diplomoj en Přerov. La ceteraj transprenis siajn diplomojn hejme de reprezentantoj de la asocia komitato.

Pri knedlikoj

Samideaninoj Marie Ribasová kaj Margit Turková prilaboras ĉeĥan-esperantan gastronomian vortareton. Embarasojn vekis la termino „knedliko“, kiun registras PIV kaj vortaroj de Prof. Krause (Esperanto-Deutsch, Deutsch-Esperanto), sed kiu estas ankaŭ kritikata kaj rifuzata. Jan Werner faris enketon, kiun respondis pluraj esperantistoj (V. Barandovská, W. Blanke, I. Koutny, M. Bavant, R. Corsetti k.a.). La kompletan enketon eblas peti rete ĉe la redakcio. Ni publikigas la respondojn de la koncernaj vortaristoj Prof. Krause, Prof. Duc Goninaz (redaktoro de nova PIV) kaj de Akademio de Esperanto.

Demando:

Ĉu la neologismo “knedliko”, prezentita en la nova PIV, estas rekomendinda kiel sinonimo de pastobulo?

Respondo de Michel Duc Goninaz:

Mi akceptis tiun terminon en la novan PIV laŭ propono de C. Günkel, kiu zorgis pri kulinaraj terminoj, kaj post kontrolo, ke tiu termino jam troviĝis en la Gastronomia terminaro de 1958. Krause kaj Kraft — ĉi-lastaj kun la hezito knedl(ik)o — ĝin registris, ankaŭ Vikipedio. Probable ĝia mencio en nova gastronomia vortaro plifirmigus ĝian uzadon. Pri la nuna reala uzado estas malfacile enketi. Se oni opinias, ke "knedliko" ne taŭgas, oni uzu la pli neŭtralan "bul(et)o", eble tamen tro vastasencan. Sed uzo de "knedlo" ŝajnas

al mi nekonsilinda pro la ebla konfuzo kun "knelo". Mi opinias, ke por la gastronomiaj terminoj oni ne povas krei normigitan nomenklaturon, similan al tiuj de sciencoj, kiaj botaniko, zoologio kc.

Respondo de Nikolao Günkel:

... ĉar mi respondecas pri kuirarto en PIV 2002, mi same respondecas pri la termino "knedliko" en ĝi. Ĉar mi intencis havi vastan fundamenton, mi kontaktis kelkajn dekojn da geesperantistoj el ĉiuj kontinentoj por diskuti pri la kuirartaj terminoj. Ĉar "knedliko" ŝajnis al ni ne malofte uzata kaj utila, ni kaj fine mi decidis enmeti ĝin. La problemo miaopinie estas, ke sur paĝo 179 estas "**pastobulo**. Knedliko" sen forketo-tranĉilo-vinjeto. Devus esti "**pastobulo**. ~o el pasto por i.a. fari knedlikon; ankaŭ uzata por la knedliko mem." aŭ io simila.

Same pri "ravioloj". Io tia ekzistas en ĉiu kuirarto niaplaneda, ekzemple en suda Germanio kiel "Maultaschen". Tial ja estas "pastopoŝetoj" en PIV 2002 sur paĝo 905.

La granda demando do estas: ĉu havi nur "pastopoŝetoj" kaj "pastobulo" en PIV 2002 aŭ ĉu same allasi specialajn terminojn kiel "knedliko", "ravioloj", "huntuno", "dariolo" ktp? Mi persone estas por la dua alternativo. Kaj miaopinie "knedliko" estas utila termino, ĉar "pastobulo" estas multe tro ĝenerala. Ĝi ankaŭ povus esti la itala "gnocchi", kiuj definitive ne estas knedlikoj, sed pastobuletoj. Interese estas, ke "buleto" laŭ Zamenhof jam havas tute specialan kuirartan signifon. La afero estas do sufiĉe tikla.

Respondo de Erich-Dieter Krause:

Jen mia konkluda opinio:

(1) Ĉar la vorto *knedliko* aperis jam en pluraj vortaroj, interalie en PIV, en miaj du grandaj vortaroj (G/Esp kaj Esp/G) kaj krome en pluraj ĉeĥaj E-vortaroj, mi konsideras ĝian forstrekon nekonsilinda. Certe la PIV-an decidon, uzi la vorton kiel hiperonimon, mi tute ne subtenas. La vorto *knedliko* estu do nur la variaĵo *tschechischer Semmelknödel* (ĉeĥmaniera bulka pastobulo, almetata kiel garnaĵo al diversaj viandoj [en formo de tranĉaĵoj]).

(2) Oni tamen povus, estonte, sekvi la proponon de K. Kraft, proponi en la vortaroj por tiu variaĵo: *knedl[ik]o*, sed tia faro neniel ŝanĝus la aferon fundamente.

(3) Mi kredas, ke *bulo* estu la ekvivalento al la germana *Kloß* (variaĵoj: *farunbulo* *Mehlkloß*, *viandbul[et]o* aŭ *hakvianda buleto* *Frikadelle*) kaj *knelo* la ekvivalento de *Klops* (variaĵoj: *viandoknelo* (Fleischklops) [se fritita: *fritbuleto el hakita viando*] kaj *fiŝknelo* (Fischklops).

(4) La vorto *pastobulo* estas, laŭ mia kompreno, *bulo el pasto*, do absolute kongrua kun la NPIV-a klarigo (sur paĝo 847): *bul[et]o farita el faruno, knedita kun likvo (precipe akvo aŭ lakto) por fari ... pastaĵon ks. ... Konklude pastobulo NENIAM povas enhavi viandon, fiŝon, moluskojn ks., sed ĉiam ties bazaj ingrediencoj devas esti pastaĵo (farunaĵo).*

Mi konscias, ke mi ne multon kontribuis al la solvo de la problemo, sed eble miaj konsideroj iom helpas al vi, ke vi trovu

vojon el tiu ĝangala senelirejo.

Respondo de Margit Turková:

Mi ne scias imagi, ke ĝuste en tiu nia gastronomia vortareto devus tute malaperi „tiu nomo“ (knedlo aŭ knedliko). ... Knedliko ja estas en vortaroj, se ĝi en nia vortareto mankus, oni pro la malapero sentus nenaturan vakuon. Tamen la formo „knedlo“ estas akceptebla. Tio estas mia nur persona opinio.

Respondo de Akademio de Esperanto

La vorto “*knedliko*” ne estas bezonata aŭ rekomendinda, se ĝia signifo estas la sama kiel tiu de “*pastobulo*”. “*Pastobulo*” povas signifi iom malsamajn manĝaĵojn laŭ landoj kaj kuirtradicioj. Se temas pri manĝaĵoj, oni klopodu nomi ilin per priskribo proksimuma, sed sufiĉa por doni ideon pri iliaj karakterizaĵoj, ekzemple: “*pastobulo kun (muelita) viando*”, “*pastobulo kun kuirita terpomo*”, “*pastobulo kun kazeo*”, “*pastobulo kun ĉerizoj*”, “*viandobulo*”, “*fiŝaĵobulo*” ktp. Se tio ne eblas, oni prefere traktu la koncernan lokan/regionan nomon kiel propran nomon kaj ne enkonduku facilanime ĝin en Esperanton kiel komunan substantivon. Pri la bezonateco de la vorto “*knedliko*” por iu alia signifo la Akademia Konsultejo ne havas opinion; la kompilantoj de gastronomiaj vortaroj, inkluzive de la demandinto mem, influos la evoluon de la lingvo tiurilate.

En la nomo de la Konsultejo de la Akademio de Esperanto, Boris Kolker, Direktoro de la Konsultejo

Rekte, kuraĝe, elegante!

Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto. Wendy Heller. Tradukis B. Westerhoff. FEL. Antverpeno. 2007. 398 paĝoj. Prezo: 27.60 €

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkiĝis ke,

a) ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni;

b) ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis freŝeldonita de FEL libro “**Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto**”, tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, traleginte la libron kun apliko de mia a-konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplena verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia movado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la XX-a jarcento.

La vivo de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona - sendube meritis detalan intervenon de sperta biografiisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto – kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke, (ho ve, nur post pli ol dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esperantlingvan leganton.

De jaro al jaro la vivobildo de Lidia Zamenhof estas fidinde disvolvita en 30 ĉapitroj kun prologo kaj epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de mem la protagonistino kaj ne malpli abunde – diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturaj kaj dokumentkopioj. Antaŭparoloj – por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la paren caro kaj per referencoj al kelkaj biografiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon.

“Ĉar ne eblas **kompreni** (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝas per la lia.” – kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: “La doktoro kaj la revo”, “Esperanto” kaj “La Interna Ideo”. Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperanto-movado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj – jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indiferenta por la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

“Rekte, kuraĝe, elegante!” Jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel Ĉe-metoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia dudek unua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelernantoj en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombritan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj – ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!

Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj – ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: dum mavaĵaj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devis inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidis deporti ĉiujn polajn judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereco prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulintaj ŝian foriron – ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia – pro antaŭvidataj komplikaĵoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia – lin ŝi demandis ĉiam antaŭ ol fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendante reveni al Pollando, sed, loĝanta en Persujo, eble li ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn...

“Se mi forlasis Amerikon, - skribis ŝi al franca korespondanto, - eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco – sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari”.

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan fakton, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe ĉeestas en la libro de Wendy Heller. La Gardanto, Shoghi Efendi, kiun ŝi konsultas konstante. Ŝiaj multnombraj geamikoj-samreligianoj, ame kaj helpeme akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiajn leterojn – pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.



La traduko legeblas senpene, ĝuinde, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj aŭ ĉe vortoj, nePIVe uzitaj. Mi kursivigu kelkajn ekzemplojn: “Multaj venis el eksterlando por viziti d-ron Zamenhof, preskaŭ *kiel pilgrimadon*”. (p.59) “Sur la scenejo staris la eta Lidia, ŝia *aparato, respektive tradukanto* kaj du aliaj esperantistoj. (p.199) “Lidia iris hejmen al Varsovio *dum* kelkaj semajnoj...” (p.232). Sed se mi pritaksu la tuton, certe, laboro de Bernhard Westerhoff meritas sinceran dankon.

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin, Rusio)

Omaĝo al Komenio aŭ kiel ni komuniku en EU?

Moravské Budějovice (7.-26.2.2009)

En la kastela ĉevalejo en Moravské Budějovice realiĝis ekspozicio pri Komenio kaj liaj opinioj pri komunikado inter la popoloj. La ekspozicion zorge preparis la geedzoj Libuše kaj Viktor Dvořák, kiuj ankaŭ en la ekspozicio deĵoris kaj donis eksplikon al vizitantoj, inter kiuj aperis ankaŭ lernantoj de pluraj lernejoj. La ekspozicion anoncis ankaŭ la loka gazeto.



Duonon el la paneloj pruntis Muzeo de Komenio en Přeřov el iama ekspozicio Komenio-Zamenhof de antaŭ dek jaroj, la novajn panelojn pri la nuntempa Esperanto-movado kreis la

geedzoj mem.



Esperanto en Moravské Budějovice aperis antaŭ 100 jaroj, kion memorigas la unua panelo. La urbo ĝis nun favoras la internacian lingvon. Ĝi ne nur mem proponis la ekspozicion, sed havas ankaŭ sian oficialan retejon en esperantlingva versio (tr. Z. Hršel) ĉe la adreso <http://www.mbudejovice.cz/EO/>.



Multlingva EU estas titolo de la supre prezentita panelo.



Panelo pri la agado de la nova societo *E-lingvo* en Brno, kies celo estas konvinki la publikon, ke por plejparto de eŭropanoj estus avantaĝe postuli de politikistoj, ke ili enkonduku Esperanton kiel eŭropan interpopolan lingvon.



Lernu el la interreto aŭ el lernolibroj
konsilas prezento de lerno-ebloj



Niaj handikapitaj esperantistoj ne povis manki en la ekspozicio.



Lingvaj kursoj en 2009



Sekcioj de ĈEA ne estis la lasta panelo de la ekspozicio.



Pluraj libroj kompletigis la panelojn.

Ankoraŭ estis prezentitaj junularo kaj pedagogio, lingvaj kaj pedagogiaj problemoj en EU, vivo kaj verko de Komenio kaj Zamenhof, pioniraj tempoj de la movado. Ĉe tableto kun kroniko la vizitantoj povis aĉeti ankaŭ kelkajn librojn aŭ ricevi prospektojn pri karitata agado por afrikaj infanoj de Ĉefdioceza Karitato en Prago.

-mm-

fotoj Jiří Tomeček

Výsledek hospodaření za rok 2008 a plán na rok 2009		
Příjmy	Skut. 2008	Plán 2009
Předplatné Starto	1 159	1 000
Konference a sjezdy ČES	96 172	90 000
Písemné kurzy	2 400	2 400
Služby členům (emailové adr.)	200	200
Prodané zboží - libroservo	1 472	3 500
Úroky z BÚ	905	1 000
Kurzové zisky	694	0
Příspěvky UEA	56 580	37 000
UK - kongresový poplatek	92 565	0
Příspěvky IFEF	8 800	8 000
Příspěvky ILEI	1 000	900
Ostatní nedaňové příjmy	21 807	0
Příjmy na ostatní subkonta	23 950	24 000
Příspěvky (Dary)	92 690	5 000
Příspěvky ČES běžný rok	28 340	28 000
Příspěvky ČES na budoucí rok	33 005	33 000
Příspěvky nad minimální	19 495	10 000
Dotace	218 791	50 000
Propagace		10 000
Příjmy celkem	700 025	304 000
Výdaje	Skut. 2008	Plán 2009
Kancel. potřeby	1 110	500
Muzeum (ČT a SY)	204 909	30 000
Konference a sjezdy ČES	79 417	80 000
Prodané zboží mimo sklad	478	500
Tisk Starto	50 202	40 000
Poštovné Starto	20 657	14 000
Poštovné ostatní	922	1 000
Poštovné, balné libroservo	1 484	600
Telefon, internet	5 181	5 000
Pronájem prostor	160	160
Náklady UEA - delegátka	1 185	1 200
Náklady UEA – kolekt. čl.	1 122	1 200
Ostatní služby	54	1 000
Poplatky banky pravidelné	2 502	2 500
Jízdné - výkon funkce	4 809	10 000
Stravné - výkon funkce	4 790	5 000
Příspěvky UEA	61 751	42 000
Poplatek UK	0	88 000
Příspěvky ILEI	2 156	1 100
Ostatní nedaňové výdaje	23 297	0
Akce klubů a kroužků	96 675	100 000
Kurzová ztráta	0	2 000
Propagace		10 000
Výdaje celkem	562 861	435 760
Výsledek hospodaření	137 164	-131 760

K výsledku hospodaření ne nutno doplnit následující

informace o stavu majetku a závazcích k 31.12.2008.

Peněžní prostředky

Pokladna korunová	6 309
Postkonto	229 647
Účet v eurech u UEA	49 042
Peníze celkem	284 998

Investice

Fin. investice (vklad u UEA)	4 039
Podílové listy	163 369
Investice celkem	167 408

Ostatní majetek

Libroservo	42 106
Inventář	138 370
Oprávký inventáře	138 370
Ost. majetek celkem	42 106

Závazky

Příspěvky pro UEA	9 100
Malovec Mirek	745
Karešová Lucie	6
Suchánek Jaroslav	200
poplatek UK	92 565
Závazky celkem	102 616

Již je nejvyšší čas ...

... zaplatit členské příspěvky na letošní rok. Většina z vás, členů, již má tuto povinnost splněnou, ale stále ještě platba od mnohých dosud chybí.

Členské příspěvky jsou základním zdrojem pro činnost svazu. Mnozí členové kromě minimálních příspěvků svazu poskytli i mimořádný příspěvek, případně finanční dar. Těmto členům patří samostatné a individuální poděkování, které je vloženo v tomto čísle Starta. Jedná se celkem o částku 19 495 Kč mimořádných příspěvků a o částku 22 000 Kč darů od našich členů.

Kdo nezaplatil do 31.12.2008 má na obálce za členským číslem „:-“.

Vratislav Hirš

EL NIAJ KLUBOJ

Brno. La jarkunveno (4.2.2009) elektis novan komitaton: M. Malovec (prezidanto), V. Podhradská (sekretario), Z. Závodný (ekonomo), M. Hruška (junularo). Al la ĝisnuna prezidanto Z. Hršel estis atribuita honora prezidanteco. La jarraporto aprezis eldonon de prospekto *Brno - ĝusta direkto* kunlabore kun la magistrato, televidan prezenton de nia junularo en februaro 2008, fondon de societo E-lingvo kaj eldonon de koncernaj propagandiloj. Kune kun la Societo por Esperanto en Brno la klubo aranĝis 42 klubajn programojn. Kurson de Eo ĉe Masaryk-universitato partoprenis 42 studentoj.

Praha. Esperantista Klubo en Praha kunvenas regule ĵaŭde posttagmeze en la kunvenejo *Ve Smečkách 25*, proksime de Venceslaa placo. Meznombro kunvenas 12 personoj, sed ekzemple la Kristnaskan vesperon ĉeestis 35 geamikoj. Krome ĉiun lastan sabaton de monato antaŭtagmeze okazas en la kunvenejo seminarioj de esperantistoj - handikapuloj. ■ La 12-an de decembro kelkaj klubanoj ĉeestis la kunvenon de pragaj rusistoj en la Filozofia fakultato de Karola universitato, dediĉitan al la forpasinta ĉeĥa poetino kaj poemtradukistino Zdenka Bergrová, kiu tradukis ĉefe la rusan poezion en la ĉeĥan. La kunvenantoj informiĝis, ke ŝiaj originalaj poemoj aperis en Esperanto kaj ke per Esperanto oni povas disvastigi la ĉeĥan literaturon tra la mondo. Pri la aranĝo aperis artikolo en *Národní osvobození* n-ro 3/2009. ■ La 16-an de februaro aperis en *MF Dnes* artikolo pri nia membrino Eva Hájíčková, kiu laboras kiel fremdul-

gvidistino en Prago. Ŝi gvidas turistojn en kvin lingvoj, inter ili en Esperanto. La redaktorino de *MF Dnes* interesiĝis pri praktika uzado de Esperanto. Pri gvidado de turistoj en Prago per Esperanto jam pli frue informis la ĵurnalo Metro.

Svitavy. En 2008 la klubo dediĉis plej multan laboron al preparo de la nova muzeo, sed sukcesis aranĝi ankaŭ Infanan Tagon en majo kaj Marcipanan Kristnaskon en decembro. Ne mankas Esperanto-kursoj en la elementa lernejo kaj en la muzeo. Pri la muzeo aperis 8 artikoloj en ĵurnaloj kaj unuhora rekta elsendo en radio. Por 2009 la klubo planas regionan renkontiĝon, Infanan Tagon, Muzean nokton, Marcipanan Kristnaskon kaj ĉefe la asocian konferencon en oktobro. Kunlabore kun ĈEA novajn ekspoziciojn en la muzeo.

Třebíč. La klubo organizis tri etapojn de la tendaro en Lančov, kiuj estas prezentitaj ne nur en la propra retejo, sed ankaŭ en la katalogo *Tábory Vysočina* kaj ties retejo.

Ústí nad Labem. La klubo havas 15 membrojn (prez. V. Novobilský, vicprez. Z. Rusín, kasisto V. Novobilská, kronikisto M. Krejčová), kunvenas lastan ĵaŭdon en ĉiu monato en la polikliniko Doktus. La programoj havas partojn prilingvan, informan, kulturan kaj korektadon de hejmtasko. Josef Kříž denove gajnis la unuan premion en konkurso de la Ĉina Radio. Zdeněk Rusín sukcesis publikigi artikolon en la gazeto por juĝejaj interpretistoj. IKF bedaŭrinde estis nuligita pro malsano de la organizanto.

Renkontiĝo en Svitavy

Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy organizis sabate la 28-an de februaro 2009 la tradician renkontiĝon de esperantistoj. Malgraŭ malfavora vetero kunvenis 35 esperantistoj el 16 lokoj de la respubliko.



Unue ili haltis en la Esperanto-muzeo, kie multaj havis la lastan ŝancon vidi la inaŭguran ekspozicion. En marto ĝi estos anstataŭigita per ekspozicio dediĉita al la 40-jariĝo de ĈEA kaj per ekspozicio de Esperanto-junularo okaze de la internacia junulara Esperanto-kongreso okazonta unuafoje en la Ĉeĥa respubliko. La trarigardado estis daŭrigata en la Urba Muzeo, kie troviĝas pluraj novaj kaj daŭraj ekspozicioj. La plej interesa punkto de la renkontiĝo estis akcepto en la urbodomo fare de vicurbestrino Mgr. Marcela Sezemská. Pri la historio de la bela vilao rakontis nova loka klubanino Milena Brzoňová.

Posttagmeza programo sekvis en la



domo de la Pedagogia-psikologia konsultejo, kie Kvido Janík el Ŝumperk rakontis kaj projekciis filmon pri vojaĝo tra Turkio, Jordanio kaj Sirio. La 28-an de marto 2009 denove alveturos esperantistoj al Svitavy por inaŭguri la supre menciitajn ekspoziciojn.

Libuše Dvořáková

100 jaroj de Esperanto en Pardubice

3-5 julio 2009

Informojn petu ĉe: Pavel Nechvíle, Fügnerova 233, CZ-533 51 Pardubice-Rosice, (00 420) 737 606 559, nechvilep@seznam.cz.

50 jaroj de Esperanto en Česká Třebová

Simpozio „Historio de Esperantomovado kaj ĝia rolo en la moderna mondo“ okazos en 2010 (9-11 septembro 2010). Informojn liveros:

zn.esperanto@seznam.cz aŭ
ladislav.kovar@tiscali.cz.

100-jara datreveno de Ivo Lapenna

Du gravaj datrevenoj okazas en 2009: D-ro **L. L. Zamenhof** (150-jara) kaj Prof. D-ro **Ivo Lapenna** (100-jara).

La *Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna*, prez.: Prof. D-ro Carlo Minnaja (red. de *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. 29 konataj aŭtoroj kontribuis al tiu ĉi ĉarma kaj interesa 417-paĝa verko), kaj la *Fondaĵo Ivo Lapenna*, prez.: D-ro Klaus Perko, instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, E.-klubojn, E.-kunvenojn k.s. ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de nia hejmpaĝo: dokumentoj, paroladoj, fotoj ktp. (bv. indiki la fonton). Jen la adreso: www.ivolapenna.org

Ilona Koutny Esperantisto de la Jaro 2008

D-rino Ilona Koutny, hungarino loĝanta en Pollando, estas proklamita la *Esperantisto de la Jaro 2008* pro la kompetenta kaj sukcesa gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. En 2008 ŝi aparte meritis rekonon pro la dekjariĝo de la Studoj, pro la ekzamen-sesio de la tria grupo, pro la unua instru-

rajtiga ekzameno kune kun ILEI, pro la komenco de la kvara grupo, kaj speciale pro la simpozio Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko, kiun ŝi pretigis kaj efektivigis septembre 2008 ĉe UAM. La elekto estas duoble rimarkinda. Unue, Ilona Koutny estas la unua virino, kiu ricevis la titolon *La Esperantisto de la Jaro*. Due, ŝi ricevis rekorde multajn voĉojn kompare kun la aliaj kandidatoj (trioble pli ol la slovaka aktivulo Peter Baláž, kiu okupis la duan lokon).

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK



18.-24.7.2009 en Kondoros, Hungario

Humura literaturo en Esperanto

Adreso: Pál Koszuch, Vasút u. 3, HU-5553 Kondoros, Hungario, +36 30 240 9970, pauljuno@freemail.hu

Postkongreso de UK en Malbork

Informojn petu ĉe: Edward KOZYRA, 82-200 Malbork, str. Mazowiecka 23, Pollando, esperanto@powiat.malbork.pl

Ni legis kaj korektis

Ĉi-foje ni legis „Starton“ n-ro 3/2008 kaj ne plaĉis al ni pluraj formoj:

1. *mi dum la UK informis kadre de la programo...* La prepozicio dum montras tempon, en kies daŭro io okazas, jes, la aktivado (ĉi tie informado) okazas nepre **dum la tuta daŭro**. Tial oni devas diri: mi informis **en** UK...

2. *dank' al [...] mi havis okazon... dank' al li la vortaro aperis...* La diraĵo kun la nuda radiko en la signifo „en danka maniero“ anstataŭas la formon: „danke al“. La kutimo envenis la lingvon jam en 1891. Mem Zamenhof sin esprimis: *Dank' al la supre montritaj reguloj la lingvo fariĝas eksterordinare facila*. Sed: la Fundamento en sia 16-a regulo instruas nin, ke elizii estas permesate nur en la kazo de la nominativa singulara -o. La adverba finaĵo -e kaj la akuzativa finaĵo -on ne estas elizieblaj. Tiu, kiu sekvas la kutimon, pekas kontraŭ la Fundamento.

3. *monto Czantoryja estas konata de Esperantistoj...* Nomo de la monto estas skribita pole, sed malĝuste. La pola nomo estas Czantoria. Ĉar la monto-supro estas ĝuste ĉe la ĉeĥa-pola limo, en nia periodaĵo ĝi do estu nomata Ĉantoryje.

4. *vizito de akvoprepara societo de Orlice...* La uzo de „societo“ ne estas

erara, sed en la kazo de produkta akvomastroma organizaĵo pli taŭgas: entrepreno, kompanio, firmao. La uzo de prepozitiva formo „de Orlice“ estas erara, temas ja pri nomo de entrepreno, ne temas pri poseda rilato. La ĝusta formo: la entrepreno Orlice.

5. *tuboj el asbesta cemento...* Asbesta cemento ne ekzistas! La tuboj ne estas el cemento, sed el speco de betono, kiun oni povus nomi „asbesto-betono“, tamen laŭ internacia konvencio oni nomas ĝin: asbestocemento (pro kancerogeneco nuntempe jam ne uzata, anstataŭigita per „fibrocemento“).

6. *vagaj fluoj detruas gisan tubaron...* Elektra kurento estas neniam nomata „fluo“.

7. *(el tuboj) akvo eskapas en la teron...* Akvo ne eskapas, eskapi povas nur vivulo: *liberigi sin de tio, kio katenas, sukcese eviti per forkuro* (el malliberejo, el batalo k.s.). Akvo povas „tralikiĝi“ (tra liko = tra fendo).

8. *Dominika muzikis per gitaro...* Per gitaro k.s. oni ne povas muziki (ludi), sed ies kapon bati. Ĝuste: Dominika muzikis **je** gitaro (ankaŭ: ludis gitaron).

9. *mia tiam kontentige evoluiĝanta agentejo...* „Evolui“ estas netransitiva verbo (vyvíjet se), tial la sufikso -iĝ estas neuzebla. Rimarko: ĉe kelkaj netransitivaj verboj ĝi estas uzebla en la kazo de statŝanĝo: sidi (*sedět*) – sidiĝi (*posadit se*). Ĝuste: mia kontentige evoluanta agentejo.

10. *ĉiuj havos okazon **praktikiĝi** pri Vikipedio...* La radiko „praktik“ estas substantiva, ĝi signifas aplik(ad)on de iu teorio en konkreta situacio (*praxe*). La transitiva verbo praktiki = apliki ion (rekta objekto)... Rilate al homo praktikiĝi aŭ praktiki sin ne havas logikan sencon. Praktikiĝi povas, eventuale, teĥnologio, leĝoj k.s., kiam la mediala formo rilatas mem la subjekton.

11. *vi kaj via frato estis grandaj **personecoj**...* Personeco ne estas persono, sed certaj spiritaj proprecoj de persono. La sufikso -ec ja ne esprimas ulon, sed econ! Ĝuste: vi kaj via frato estis grandaj personoj; se ili estis eminentuloj, ni povas diri: personuloj (*osobnosti*).

12. *Esperanto enhavas plej grandan nombron de **difinoj** (en Vikipedio)...* En vikipedio ne aperas difinoj, sed artikoloj, priskriboj, ankaŭ aktualaj komentarioj. Ili laŭnecese povas enhavi „difinon“. Difino estas konciza klarigo de nocio pere de necesaj kaj sufiĉaj karakterizaĵoj, ĝi aperas en terminologiaj verkoj, ne en verkoj de enciklopedia karaktero.

13. ***Des pli** ĉeĥaj organizaĵoj ne povis kredi...* En okazoj esprimantaj nur konsekvencon (des) kaj ne la kaŭzon (ju), estas pli korekte uzi **tiom** (pli) anstataŭ des (pli).

14. ***Nur min** malĝojigas, ke...* Laŭ la kunteksto mi juĝas: aŭtoro ne deziris komuniki, ke nur lin kaj neniu alian io malĝojigas, sed, ke lin malĝojigas

nur tio (kaj ne la ceteraj aferoj). Memoru, ke la adverbo nur (kaj pluraj aliaj) devas situi ĝuste antaŭ la rilata vorto aŭ fraz-parto, en tiu ĉi kazo antaŭ la subordigita propozicio, komenciĝanta per la subjunkcio „ke“.

15. ***eluzos ĝin** por bonstato de la homaro.* Aŭtoro de la teksto ne scias signifon de la verbo „eluzi“ (laŭ PIV): Difekti per longa uzado: *li eluzas siajn ŝuojn kun stranga rapideco...*

16. ***estis sabate** [...] **inaŭgurita** nova muzeo...* En la frazo estas nekonvene apartigitaj la helpa verbo „estis“ kaj la sence apartena verba adjektivo „inaŭgurita“. Ĝuste: ...sabate estis inaŭgurita...

Estas tre bedaŭrinde, ke ĈEA toleras tian malaltan lingvan (kaj ne nur lingvan!) nivelon de sia periodaĵo. Estas bedaŭrinde, ke la gravajn erarojn ne korektis la redaktoro nek la lingvaj korektistoj, du eĉ eksterlandaj. Estas vere bedaŭrinde, ke la landa asocio dum jardekoj malzorgas la lingvan klerigadon de la membroj, eĉ la nova komitato, elektita oktobre 2008, tute preterlasas esperantologion kaj altigadon de la lingva nivelo de ĉeĥaj esperantistoj.

2008-12-24

Jan Werner

Rimarkigo de la redakcio: La esprimon **dank’ al** enkondukis Zamenhof mem pro belsoneco kaj regule ĝin uzis, same ĝin uzas la tuta esperant-

lingva literaturo, registras ĉiuj vortaroj. Ĝi estas jam klasika frazeologiaĵo, sekve ni ne povas instrui, ke ĝi estas eraro. Sed necesas scii, ke ĝi estas escepto, sola kazo de eliminata adverba finaĵo -e, kiu ne pravigas fari la samon ĉe aliaj adverboj. La prepozicion **dum** Zamenhof ne uzis ĉiam strikte en la senco **dum la tuta daŭro** (Malnova Testamento: *La nomo de unu estis Peleg, ĉar dum lia vivo dividiĝis la tero. Kie estas la viroj, kiuj venis al vi dum la nokto? Dum li ankoraŭ parolis kun ili, venis Raĥel kun la ŝafoj de sia patro.*) Ĉe muzikiloj Zamenhof uzis prepozicion **sur** (PIV: *Volu ludi ion sur tiu ĉi fluto. Fortepiano, sur kiu oni ludis jen lerte kaj sperte, jen lernis ludi.*) kaj ankaŭ la kritikatan **per** (PIV: *la popolo muzikis per flutoj*). En la angla ekzistas **the escape of gas**, la eskapo de gaso - kiu rajtas dekreti, ke en Esperanto tio ne eblas? Laŭ PIV **fluo** estas uzebla sinonime ankaŭ kiel **kurento**. Grava persono estas nomata **gravulo** aŭ **eminentulo**, sed **personulon** konas neniu vortaro. Pri la eraro **evoluiĝi** la eksterlanda kontrollegantino atentigis, sed la redaktoro la atentigon pretervidis.

Nia asocia komitato akceptis en sian planon instigi la membrojn kontribui al Vikipedio aŭ traduki turismajn tekstojn, ĉar nur tiu, kiu verkas, interesiĝas pri funda sciado de la lingvo kaj kapablas dediĉi al trastudo de Plena Gramatiko kaj Plena Ilustrita

Vortaro monatojn da diligenta privata strebado.



*Klub esperanta a jiných světových jazyků
Theodora Kiliana Třebíč pořádá*

57. ročník jazykových kurzů v Lančově v esperantském táboře

1. běh : 5.7. – 18.7. 2009 E, A, N
2. běh : 19.7. – 1.8. 2009 E, A, Š, N, R
3. běh : 2.8. - 15.8. 2009 E, A, N

Děti do 15 let na kurz E	2.900 Kč
Pro starší 15 let na kurz E.	3.100 Kč
Děti do 15 let na ostatní jazyky	3.350 Kč
Pro starší 15 let na ostatní jazyky	3.550 Kč
Děti do 15 let bez zařazení	3.250 Kč
Pro starší 15 let bez zařazení.	3.450 Kč

Poplatek zahrnuje kurzovné, ubytování i stravu. Při platbě do 30.4.2009 se poplatek sníží o 200 Kč

Esperanto, 674 01 Třebíč

www.set-lancov.cz

info@set-lancov.cz

č. ú. u GE Money Bank a.s.

6401502754 / 0600

variabilní symbol je datum narození účastníka (např. 19930502 = 2. května 1993)

KALENDARO

2009-02-07 100 jaroj de EK Prostějov
2009-02-07/26 Ekspozicio „Omaĝo al Komenio aŭ kiel komuniki en EU“, Moravské Budějovice
2009-02-28 Renkontiĝo en Svitavy
2009-03-28 Inaŭguro de ekspozicio „Esperanto kaj junularo“ en Svitavy
2009-07-03/05 Internacia solena renkontiĝo okaze de 100 jaroj de Esperanto en Pardubice, nechvilep@seznam.cz
2009-04-03/05 Sabla Printempo en Písek
2009-07-05 - 2009-08-15 Somera Esperanto-Tendaro Lančov, info@set-lancov.cz
2009-07-18/25 65-a Internacia Junulara Kongreso en Liberec
2009-08-22/30 EKOTUR, tradicia turisma renkontiĝo de biciklantoj kaj piedturistoj
2009-10-09/11 Konferenco de ĈEA en Svitavy
2009-10-12/18 InPaSem, Dobřichovice
2009-11-06/08 Terminologia seminario Dobřichovice
2009-12-12 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek
2010-09-09/11 Simpozio okaze de 50-jariĝo de Esperanto-Klubo en Česká Třebová

Ni kondolencas

- la 9-an de septembro 2008 mortis s-ino **Marie Jakubcová** el Hranice, 66-jara
- la 23-an de decembro 2008 forpasis s-ino **Marie Laubová** (86-jara) el Roudnice, edzino de Jiří Laube

El la asocia komitato

Sabate 24. 1. 09 kunvenis en Svitavy estraro de ĈEA. La plej grava punkto de la programo estis transdono de la funkcio de asocia kontisto fare de Ing. V. Hirš al s-ino Libuše Hýblová kaj aprobo de la buĝeto por la jaro 2009. Pritraktita estis preparo de ekspozicio en E-muzeo en Svitavy okaze de la 40-jariĝo de nia asocio. Ĝia festa malfermo okazos

sabate 28. 3. 2009.

Kontrolitaj estis preparoj de junulara kongreso en Liberec, Sabla Printempo en Písek, tradicia aranĝo "Muzea nokto", kiun aktive partoprenos muzeo en Svitavy (13. 6. 2009) kaj ĉefe Konferenco de ĈEA en Svitavy (9. - 11. 10. 2009).
-pký-

Gelernantoj pri Esperanto-Muzeo

La 10-an de novembro 2009 grupeto da geknaboj de la 9-a klaso de loka elementa lernejo (Riegroga 4) vizitis Esperanto-Muzeon en Svitavy kaj poste verkis mallongajn eseojn pri Esperanto, kiujn ili kompletigis per materialoj atingitaj pere de interreto (fotoj, flagoj ks.). Knabinoj (Daniela Myšková, Iva Sedláková, Eva Trávníčková, Tereza Vyjídačková) kaj knaboj (Josef Jura, Petr Novotný, Marek Poštulka, Ivan Šivák, Tomáš Mihola) skribas pri Esperanto, Zamenhof, pri la muzeo mem, pri la 75-jariĝo de la movado en Svitavy. La eseoj estas legeblaj ĉe la adreso

http://www.zsriegrova.svitavy.cz/aktu/081110_esperanto.pdf (ĉeĥlingve, destinitaj por aliaj geknaboj de la lernejo).

Korespondemuloj

Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku, Wasedamati 12-3, Tokio, Japanio. Skribante al ni korespondopeton, bonvolu aldoni viajn aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj preferojn.

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete V. Hiršovi seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření

listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhradíte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č. ú. 0017 011 013/0800, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 990,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 590,-Kč
La Gazeto: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 580,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 350,- Kč.

Juna Amiko: 260,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1040,- Kč (*700,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Heroldo de Esperanto: 1130,- Kč (*760,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

Femina: 700,- Kč (*460,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Litova Stelo: 290,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*označená cena v závorce platí pro předplatitele mající esperantské občanství (v organizaci „Esperanta civito“)

Periodikum Českého esperantského svazu - 40. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
tel. 774 928 974**

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2009

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 40-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
7.5.2009**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.



El la libroservo de ĈEA

Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131,
696 42 Vracov

Glumarkoj - arŝik samolepek (5,-)

Ulrich: **Paolo, lernanto de Leonardo da
Vinĉi (130,-)**

Chrdlová: **Kantoj por ĝojo (2-a eldono)
(86,-)**

Laube: **Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo?
(44,-)**

Malovec: **Gramatiko de la ĉeĥa lingvo
(39,-)**

Výzva

Pokud máte zájem spolupracovat na přepisování esperantských knih a rukopisů do počítače pro připravované DVD a pro digitální knihovnu svazu, napište redaktorovi Starta.

